

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO

Jarabono : 50 fkoi

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

MAJO - JUNIO

1982 - 3

KULTURAJ KAJEROJ

1982 MAJO-JUNIO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj V. Benczik

Pri la Mimozo Ménétrier
Trad. Maillart

Paleolitikaj Venusoj S. Guillot

Marko d'oro la novelisto I. Nagy

Tio restu inter ni ! D. Borisov

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

Baldaŭ malfermiĝos la pordoj de la kastelo. Baldaŭ, la 31-an fojon, envenos multaj homoj el tre diversaj landoj por ĉeesti kursojn, aŭskulti prelegojn, simple ripozi kaj travivi spertojn jam konatajn de pluraj sed tute ne renkontitajn de multaj. Jen iom detala programo de la diversaj ĉisomeraj periodoj.

Unua periodo : prelegos S-roj Boyet, Griffith, Métivier, Roose, Rousseau, Stevens, Stiling pri tre diversaj temoj. Eble aliaj prelegoj estos prezentitaj. Dum tiu periodo la Pariza Trupo TESPA prezentos la teatraĵon, kiun ili ludos en Anverpeno : « Sen Eliro » de J.-P. Sartre.

Dua Periodo : krom la kursoj jam anoncitaj verŝajne okazos ankaŭ aliaj aktivaĵoj el kiuj kelkaj paroladetoj kaj diskutoj pri ĝeneralaj temoj de la Historio de Esperanto.

Tria Periodo : La trian fojon S-ino Audrey Childs-Mee gvidos seminarion pri rektmetoda instruado de Esperanto. La interesatoj ĉeestos la teoriajn kaj praktikajn prezentojn de la metodo de S-ino Childs-Mee kaj eĉ povos mem gvidi kursojn laŭ tiu metodo ricevante poste ateston pri la gvidado. La celo de tiu seminario ne estas diskuti pri la metodo sed ĝin ellerni kaj ekpraktiki.

Dum la sama periodo S-ro Hugo Röllinger prezentos prelegojn : « Per la vento al la Poluso », « Maroko », « Orientaj aspektoj de l'Okcidento » ; « Naskiĝo de l'Arto ».

Kvara Periodo : diversaj artmetiaj kursoj estos gvidataj de fakuloj en Esperanto kompreneble. Okazos ankaŭ komuna lego de libro. Povos ankaŭ okazi kurso por komencantoj.

Poste, 28an/29an de aŭgusto. L. F.-Koop organizâs « Esperanto-Rendevuo ».

Alloga programo por vi ĉiuj, ĉu ne ?

ESPERANTO -- RENDEVUO

organizita de Kooperativo de Literatura Foiro

Gresillon — 28an/29an de aŭgusto 1982

Kursoj :

por komencantoj	gvidata de Suzanne Bourot
por perfektiĝo	gvidata de Giorgio Silfer
por infanoj	gvidata de Juanita Turbillon

« Julio Baghy humuristo kaj satiristo », komuna malkovro de ne tre konata aspekto de la verkisto gvidata de Perla MARTINELLI.

Informojn donas : Esperanto-Domo, kastelo Gresillon
49150 Baugé Francio

kaj Kooperativo de Literatura Foiro
C.P. 417
2301 La Chaux-de-Fonds Svislando

Esperanto tra la Mondo

La universala kongreso finpretiĝas :

— 19 ekskursoj (8 tuttagaj kaj 11 malpli longaj) okazos dum la universala kongreso en Antverpeno. Praktike, la kongresanoj havos elekton por vidi preskaŭ la tutan landon.

— Postkongresa ekskurso sestaga estos proponita tra Francio (Reims, Epernay, Troyes, Colombey-les-deux-églises, Chaumont, Dijon, Beaune, Vézelay, Paris).

— Kongresa poŝtmarko. La oficiala eldondato de la speciala kongresa poŝtmarko de 10 BF estis la 7a de Junio.

— Krom la kutimaj eroj de la kongreso, oni tiujare anoncas « Verkemulan atelieron », tuj post la kongreso, de la 2a ĝis la 6a de Aŭgusto en Hago. Tiu literatura seminario estos gvidata de William Auld.

Kongreso de S.A.T. :

Ĝi okazos en Iisalmi (Finnlando) de la 31a de Julio ĝis la 6a de Aŭgusto. Krom la kutimaj eroj, la programo entenas renkonton kun laboristoj en la industria vilaĝo de Iisalmi kaj filatela stampado.

Du postkongresaj ekskursoj estas planitaj : unu en Laponio, la dua al Leningrado. Ambaŭ okazos de la 7a ĝis la 9a de Aŭgusto.

Esperanto forumo en kongreso de sciencfikcio :

De la 10a ĝis la 15a de Aŭgusto, okaze de la Eŭropa Kongreso de Sc encfikcio, okazos Internacia Literatura Forumo, organizita de « literatura Foiro ».

Adreso : Cheminots 23, CH-2300 La Chaux-de-Fonds.

Kelkaj aliaj renkontoj :

— 12a Amikeco-Kongreso (...sen paroladoj), en Egmond-aan-Zee / Alkmaar (Nederlando), de la 1a ĝis la 7a de Septembro. Informas : P. Delaire, B.P. 2002, F-45010 Orléans, Francio.

— Renkontoj en montaro aŭstria, en Maria Alm, de la 4a ĝis la 10a de Septembro, de la 15a ĝis la 22a de Januaro 1983, de la 22a ĝis la 28a de Januaro 1983. Informas : Monda Turismo, 27/10/2, A-1100 Wien.

Por la gejunuloj :

— Internacia Esperantista Laborbrigado Arkeologia, en Debnevo, de la 8a ĝis la 31a de Aŭgusto, en Bulgario : 7 horoj tage pri arkeologiaj prifosoj, ekskursoj, muzikvesperoj. Informas (ankaŭ pri du aliaj renkontoj en Bulgario), Orna Bes, p.k. 29, B.G. — 5500 Loveĉ, Bulgario.

— Samtempe kun festivalo por mezaĝuloj, Germana Esperanto-Junularo organizos sian 26an Internacian Seminanion en Oberwesel, ĉe la Rejno, de la 27a de Decembro ĝ s la 3a de Januaro. Informas : G.E.J., pf 1450, D — Paderborn.

— Dumsemajnaj laboretapoj dum la tuta somero en « La muelejoj de metilernantoj », en centra Francio. Oni laboras nur 4 — 5 horojn ĉiutage ; estas libertempa programo. Indiku krome se vi povas instrui Esperanton (dum Aŭgusto). Sribu al Georges Mazaud, 322, avenue de la Châtre, F — 36000 Châteauroux, Francio, aŭ rekte al « Les Moulins des Apprentis », F — 23220 Bonnat (Creuse), Francio.

— Renovigo de malnova biena ĉefdomo kiu fariĝu junulara renkontejo, en Schlüchtern (F. R. Germanio), de la 25a de Julio ĝis la 7a de Aŭgusto. Skribi al Eki Woite, An der Kirche 33, D — 6115 Münster, F.R. Germanio.

— Laborbrigado en Bialystok (Pollando), de la 12a ĝis 30a de Julio. Alporti dormsakon kaj blovmatraĉon. Adreso : P.E.A., Filio en Bialistoko, Str. Lipowa 14, B alystok 15 — 427, skr. poczt. 67, Pollando.

— Pluraj renkontoj en Hungario. Informiĝu skribante al H.E.A., Pf. 193, H — 1368 Budapest.

Novaj eldonaĵoj :

— « Liberté ou autorité dans l'évolution de l'Esperanto ». Triacikla franclingva doktoriga disertacio prezentita en Sorbono de François Lo Jacomo. 384 paĝoj. Prezo : 90 FF.

— « Rakontoj el la unua poŝo kaj rakontoj el la dua poŝo ». Noveloj de la ĉeĥa verkisto Ĉapek. 285 paĝoj.

— « La diroj de Mateo ». Traduko de la libro de la franca pedagogo Célestin Fre net. Baza verko de la reforma pedagogia movado, kiu portas la nomon de la aŭtoro.

— « La verda relo ». Beletra antologio pri la fervojo. Poemoj kaj prozaĵoj, originalaj kaj tradukitaj.

— Du libroj pri japanaj poeziaj formoj : « Skiza historio de la utao », de Masao Miyamoto, kun traduko de ĉirkaŭ 270 utaoj. « Hajka antologio ». Redakciis M. Miyamoto kaj M. Ueyama.

— « Makedonaj popolaj rakontoj ». 141 paĝoj.

— « Enkonduko al literatura kritiko » de G.orgio Silfer.

Kursoj en lernejoj :

Oni lasttempe anoncis kursojn de Esperanto en gimnazio de Graz (Aŭstrio), en eksperimenta klaso de Locarno (Svislando) kaj en lernejo de Myköping (Svedio).

En Ĉinio :

La esperanto-movado daŭre disvolviĝas en Ĉinio. En multaj urboj, kursoj malfermiĝas. Ili arigas milojn da partoprenantoj.

Esperanto-societo estis fondita en la universitato de Hangzhon. 250 esperantistoj ĉeestis dum Januaro la duan kongreson de la Pekina Esperanto-Asocio. Dum la du lastaj jaroj, la asocio funkciigis 17 kursojn en kiuj partoprenis 700 lernantoj. Ĝi eldon s ĉinlingvan tradukon de « Kompleta gramatiko kaj vortfarado de Esperanto ».

Libroj por fakuloj kaj sciencistoj :

— « Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko ». 225 personoj priskribitaj kun foto kaj listo de verkoj, 1445 personoj laŭfake listigitaj. 275 paĝoj.

— Aperis en Paderborn (F.R. Germanio) 382-paĝa libro pri la 6a renkont ĝo pri komunikado kaj kibernetiko.

— « Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko Apliko de komputiloj ». Du volumoj eldonitaj en Ĉeĥoslovakio. Kolekto de referaĵoj pri diversaj sciencaj temoj.

Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj

/BUDAPEŜTO, 1982 03.19. — 03.28./

La Esperanta Kulturo havis gravan feston inter la 19-a kaj 28-a de marto 1982 en Budapeŝto : enkadre de Budapeŝta Printempa Festivalo okazis *Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj* kun entute dek du teatraj prezentadoj fare de aktoroj el kvar landoj : Francio, Hungario, Pollando kaj Sovetio. Pri la *Renkontiĝo* aperis faldfolio prezentanta la kontribuantajn trupojn kaj la prezentatajn teatraĵojn, kaj aperis pri ĝi kaj pri la historio de Esperanto-teatro informoj en ĉiuj oficialaj eldonaĵoj /tiuj aperis amase en pluraj lingvoj/ de Budapeŝta Printempa Festivalo. Tiun ĉi *Renkontiĝon* fakte iniciatis kaj financis Hungarlanda Turisma Oficejo, konforme al la rekomendoj, kiujn akceptis la Monda Konferenco de Turismo, okazinta antaŭ tri jaroj en Manilo. Ĉi-sube vidu kronikon de tiuj dek tagoj, kiuj vekis vastan reeĥon ankaŭ en la nacilingva gazetaro, radio kaj televido.

Unua tago : « Profeta premiero »

La 19-an de marto je la sepa horo vespere estis plenplena la Budapeŝta Teatro « Miklós Radnóti ». Esperantistoj plenigis ĝin, por ĉeesti la premieron de la teatraĵo « Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l'Profeto ? » de János *Elem.* /La teatraĵo aperis ankaŭ libroforme, en dulingva — nungara-Esperanta — eldono. Ĝi mendeblas ĉe ĉiuj libroservoj./ Tamen, antaŭ ol komenciĝis la spektaklo, aktorino *Virág Döry* laŭtlegis Esperante kaj hungare la salutleteron, kiun sendis al la Renkontiĝo Baldur *Ragnarsson,* vicprezidanto de U.E.A. Post tio d-ro Imre *Pethes,* vicprezidanto de Hungara Esperanto-Asocio oficiale malfermis la *Renkontiĝon.*

Tiu prezentado de « Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l'Profeto ? » estis vera premiero, ja ĝi verkiĝis en la hungara lingvo, tamen ĝi ne aperis ankoraŭ sur hungaraj scenejoj : ĝi surscenigis la unuan fojon nun — en Esperanto. Jen koncize la intrigo :

Fantazia turisma entrepreno organizas ekskurson al dezerto, kaj kontraŭ alta pago ĝi disponigas al la partoprenantoj « kompletan turisman malkomplezecon », t.e. oni lasas ilin por du semajnoj meze de la dezerto, kun nutraĵoj kaj tendoj, sen ia ajn programo. La ĉiĉerono, kiu cetere ne komprenas, nur parolas /!/ la lingvon de la turistoj, adiaŭas ilin jene : « Se plaĉos al vi, proklamu vin reĝoj, boru tunelon tra la dezerto, eksperfortu, eĉ amu unu la alian, buĉu vin mem kaj viajn gekunulojn, kreu novan ŝtatoformon, blasfemu, ignoru la aliajn aŭ provu kompreni vin al ili ... ». El tiu situacio kompreneble kreiĝas kaj konfliktoj kaj amuzaj scenoj, sed ne mankas ankaŭ lanĉo de filozofiaj demandoj, ekzemple : « kion oni faru, estante libera ? ». La rolojn de diversaj turistaj tipoj plenumis elstaraj hungaraj aktoroj, tutlande konataj per filmoj kaj televido. Ili konatiĝis en 30-hora intensa kurso kun la baza gramatiko kaj kerna vortaro de Esperanto, kaj nur poste ili eklernis la rolojn mem. Tiamaniere Esperanto fluis el ilia buŝo nature, bele, kiel la propraj vortoj, ja ili ne papage ellernis la tekston, sed vere alproprigis ĝin.

Dua tago : « Ĉu Dio bojas ? »

« La Krizalido », Teatro Internacia de Akvitanio jam plurfoje prezentis tiun ĉi pensigan teatraĵon de la franca dramisto *Boyer* kun granda sukceso. En la teatraĵo temas pri kretenino, kiu en la bojado de hundoj supozas aŭdi Dian averton pri tertremo. La aŭtoritatoj sendas sian solan oficiston, kiu en unu persono estas policisto, juĝisto kaj preĝisto /pastro/, por ke li silentigu la knabinon, kies deliraĵoj povus kaŭzi panikon ĉe la loĝantaro. Sed venkas ne li, la sendito de la socio, sed ŝi, en kiu ankoraŭ ne subpremiĝis la naturaj ecoj. Solen kaj Arno *Lagrange* plenumis la du ĉefajn rolojn.

Tria tago : « In memoriam Kâlmân Kalocsay »

Tiu ĉi literatura-muzika podia programo okazis en la Sukeraĵejo Korona, tradicia ejo de



Sceno el « Ĉu vi vidi jam la piedsignon de l'Profeto ? ». Denise KARPATI (Kristina), kaj Levente MARAVETZ (Adamo).

Foto de Z. Fejér.

altkvalitaj literaturaj vesperoj en la hungara kaj aliaj lingvoj.

Cetere, en Abaujszántó, en la naskiĝurbeto de Kalocsay, dum la sama tago oni inaŭguris memortabulon pri la granda esperantista poeto-tradukisto, kaj ankaŭ Kalocsay-straton.

Kvara tago : sovetianoj kaj polino

En la kvara vespero Jadwiga *Gibczynska* el Pollando prezentis « Slavajn fabelojn » de *Lesmian*. Du aktoroj de Leningrada Esperanto-Teatro prezentis podian koncizigon de la Ŝekspira « Hamleto » en formo kuraĝe eksperimenta kaj impresa.

Kvina tago : « Zamenhof » kaj ripeto

La 23-an de marto pro nealveno de Pola Esperanto-Teatro oni ŝanĝis la programon, kaj tiu ŝanĝo alportis veran sukceson : Jadwiga *Gibczynska* prezentis — premiere — sian monodramon « Zamenhof ». Ŝi bildigis por la publiko la luktoplenan vivon de la aŭtoro de Esperanto per la vivigo de tri virinoj, tre proksimaj al li : la patrino, edzino kaj filino. La klara kaj proporcia konstruo de la dramo, kaj la senceremonia, tamen impresa ludo havigis al la publiko tre belan teatran travivaĵon.

Post tiu spektaklo estis ripetitaj la plej interesaj programeroj de la Kalocsay-memorvespero.

Sesa tago : « Profeto » ripetiĝas

Ankaŭ ĉe la dua prezento de « Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l'Profeto ? » la spektejo estis plenplena. Sed ĉifoje ĝin plenigis ne nur esperantistoj, teatraj fakuloj kaj ĵurnalistoj, sed ĉeestis ankaŭ ĉ. 40-membra grupo de diversnaciaj turismaj fakuloj, inter ili pluraj altrangaj funkciuloj de Monda Turisma Organizo /WTO/.

Sepa tago : Triumfo de artismo

La teatraĵo de B. Vasilev : « La aŭroroj ĉi tie estas silentaj » antaŭ ĉ. 10 jaroj furoris en multaj teatroj de Eŭropo. Spektintoj de ĉiuj signifaj prezentadoj firme asertas, ke la Budapeŝta prezentado estis unu el la plej bonaj. Ĝi estis ludita ĉ. 300-foje. Kaj nun la sama teamo de geaktoroj kaj reĝisoro revivigis tiun prezentadon de antaŭ ok jaroj. Sed pri kio temas la teatraĵo mem ? Dum la dua mondmilito ie malantaŭ la fronto, en la soveta landinterno ĉefserĝento Vaskov — vundita esploristo — komandas kelk-kapan gardistaron de ne tre grava militbazo. Ĉar mankas bataltaskoj, la soldatoj perdas disciplinon, drinkas, ĉasas virinojn. Vaskov daŭre petas de sia ĉefo soldatojn, kiuj ne drinkas kaj virinumas, ĝis fine tiu sendas al li kvin soldatinojn, kaj post kelkaj tagoj eĉ sesan, eksamatinon de iu kolonelo. La ursa ĉefserĝento ne scias kiel rilati al la virinoj, kaj el tio kreiĝas pluraj amuzaj scenoj. La leĝeran etoson tamen de tempo al tempo rompas la soldatinoj kaj ankaŭ la ĉefserĝento mem : klariĝas, ke ili ĉiuj havas animajn vundojn. Vaskov-on forlasis la edzino kaj mortis lia fileto, kaporalo Rita Osjanina perdis la edzon en la dua tago de la milito, Sonja Gurviĉ, judino, nenion scias pri la gepatroj, kiuj verŝajne mortis en la



Sceno el « La aŭroroj ĉi tie estas silentaj ». De maldekstre : Gabi JOBBA (Rita), Maria RONYECZ (Liza), Zsuzsa SZILAGYI (Galja), Virag DORY (Jenja), Athina PAPADIMITRU (Sonja), kaj Zoltan GERA (Vaskov).
Foto de M.-T. I.

getto de urbo Minsk, Galja Ĉetvertak estas orfino, dolore fanfaronanta ĉiam pri fantazia patrino, al Ĵenja Kolmekova oni murdis la tutan familion, por Liza Briĉkina la eksplodo de la milito nuligis la eblon atingi mezlernejon. La tragedio disvolviĝas el hazarda maikovro : Rita, kiu ĉiunokte elŝteliĝas el la bazo por viziti sian fileton en la najbara vilaĝo, en la arbaro renkontas du germanajn soldatojn. Ŝi raportas al Vaskov, kiu decidas kapti la du malamikajn soldatojn. Sed poste, jam malfrue, evidentiĝas, ke estas ne du, sed dek ses germanaj soldatoj, kaj ĉiuj kvin knabinoj mortas. La enhavo de la teatraĵo havas plurajn tavolojn : ĝi estas neforgeseble bela arta monumento por la virinoj, mortintaj dum la milito ; ĝi estas ankaŭ potenca protesto kontraŭ *ajna* milito ; kaj fine ĝi lanĉas ankaŭ moralan-filozofian problemon : kiagrade gvidanto rajtas disponi pri la vivo de siaj gvidatoj ?

La reĝisoro, István Iglódi, faris bravaĵon : sur malgranda scenejo li kapablis sorĉi marĉon, arbaron aŭ militbazon, sen rekvizitoj kaj dekoracioj. La sola rekvizito estis grandega reto, kiu en ĉiu momento servis pli efike la draman efekton, ol du kubaj metroj da perfektaj armeaĵoj. La utiligo de spaco kaj tempo estis skrupule ellaboritaj ĝis la plej etaj detaloj, tiel la prezentado havis daŭre plirapidiĝantan ritmon dum du plenaj horoj. La lasta sceno kvazaŭ kronas la tuton : reaperas la kvin knabinoj, jam sen uniformoj, en nigraj jupo kaj bluzo, kaj kantante belegan plorkanton, ili metas po unu kandelon sur la scenejon kaj malaperas — eĉ ne revenas por klini sin antaŭ la publiko.

Oka tago : « La Evento »

La dua prezentado de « La Krizalido » estis Esperanta premiero, de « La Evento » de la franca dramisto *Foissy*, kaj tiu ĉi vespero fariĝis vere *evento* por la spektantoj. La amuzaj scenoj, rezultantaj el paneo de televidaparato, daŭre ridigis la spektantojn, tamen ankaŭ pripensigante ilin pri la osceda *piteco* de la vivo de geedzoj Pito. La elekto de tiu teatraĵo estis plentrafo de Solen kaj Arno *Lagrange*.

Naŭa tago : Amatoraj trupoj

Posttagmeze en la Kulturdomo « Láng » la amatora Teatra Trupo « Garabonciás » el la hungara urbo Kecskemét prezentis la verkon de Béla *Balázs* : « La kastelo de la blubarba princo », tradukitan de Márton *Fejes*.

La Teatra Trupo « Gorgó » el Budapeŝto prezentis la erotiketan komedieton « La naskiĝo de la relikvo » de Pietro *Bambi*.

Vespere en la Teatro « Miklós Radnóti » triafoje oni ludis la « Profeton ».

Deka tago : Sukcesoj

Posttagmeze rikoltis merititan sukceson la internacie konata esperantista pupartisto Roberto Banky, per sia « Pup-cirko ». La lerte kunmetita kaj majstre prezentita programo katenis ĉies atenton, eĉ tiun de komencantoj, ĉar la lingvaĵo de la spektaklo estis rimarkinde facila.

La nur 20-minuta « Li trosalis » de *Ĉeĥov* en la plenumo de Oleg *Popkov* kaj Raŝid *Hajrullin* /Leningrada Esperanto-Teatro/ estis majstra perado de karakterize rusa humuro al internacia publiko.


Vespere ripetiĝis « La aŭroroj ĉi tie estas silentaj ».

Finaj diversaĵoj

Fine de tiu ĉi iom tre longa kroniko staru citaĵo el luksa kajero, kiun eldonis Hungarlanda Turisma Oficejo pri la *Budapeŝta Printempa Festivalo '83* : « Kompreneble ni ripetos venontjare la plej sukcesajn aranĝojn, kiel la Internacian Renkontiĝon de Esperanto-Teatroj ... ». Se estos vere tiel, hungaraj — kaj alvenontaj eksterlandaj — spektantoj povos vidi ankaŭ tiujn teatrojn, kiuj ĉi-jare ne povis esti invititaj, kaj la Esperanta kulturo denove fariĝos pli riĉa.

Estas notinde, ke ĉiuj programeroj de la *Renkontiĝo* estis registritaj sur magnetofonkasetoj, fare de bonaj /teatraj/ fakuloj. « Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l'Profeto ? » kaj « La aŭroroj ĉi tie estas silentaj » estis registritaj ankaŭ sur video-kasetoj nigre-blankaj. Do, la vortoj kaj bildoj ne forflugis, sed konserviĝis por la estonto ...

V. Benczik
ĉefredaktoro de
« Hungara Vivo »



Sceno el « La Evento » de Foissy, en prezento de « La Krizalido ». Sur la foto : Solen kaj Arno LAGRANGE (gesinjoroj Pito).

Foto de Z. Fejér.


PRI LA MIMOZO

Agrablan surprizon eksentas la vojaĝanto, kiu veturas ĉe la mediteraneaj bordoj, de Januaro ĝis Marto, ĉu fervoje, ĉu ŝtatvoje, kiam li ekvidas inter pinoj kaj lentiskoj mimozarbarojn, kiuj metas oran kaj verdan kovraĵon sur la Esterelaj montoj kaj montetoj de Fréjus ĝis Cannes. Tiu vintra floro, kiu kumulas riĉecon de la verdaj kaj flavaj nuancoj kaj la mielajn parfumojn de la genistoj kaj citizoj, estas kiel odora rebrilo el tiu suno de nia « lazura marbordo », kies orangflavan nuancon ĝi alprenas.

Nu, la vojaĝanto vidante tiujn mimozojn ne povas imagi, ke ili ne estas samspecaj plantoj. Efektive, la mediteraneaj mimozoj fakte estas akacioj, el la legumenacospecio. La vera mimozo (el la latina « mimus », kiu signifas « kiu kunstreĉiĝas kiel mimo ») estas planto Brazildevena, kutime nomita « sensitivo ». La verkisto kaj granda vojaĝanto Blaise Cendrars ĝin personigis en unu el siaj verkoj : « Mi transiris densejon el altkreskaj mimozoj. Siajn branĉojn ili disŝovis kun sibleto, ĉar estas sentebleco kaj preskaŭ nervozecarboj ».

Ni menciu, ke la vojaĝanto estus simile surprizita eksciante, ke la arbo kun blankaj floroj, kiun oni nomas « akacio » estas fakte « robinio » — Kia komplikaĵo !

Niaj falsaj mimozoj estas arboj de kvar ĝis dek metroj altaj. Iliaj verdetaj frondoj estas garnitaj de folioj ekstreme delikataj, kiuj similas plumojn. De Januaro ĝis Marto, ili kovriĝas per flavaj buletoj, kiuj varias de fringela ĝis ora koloro. Ĉiu el ili estas kuniĝo de pluraj etetaj floroj ŝarĝitaj je poleno. Ĉie, en tiu ĉi sezono, ili kvazaŭ pr.lumas la montetojn kaj la ĉirkaŭajn parkojn ; Kanno estas ilia vera hejmo. Cetere oni malkovris mimozon, la unuan fojon, en la ĝardenoj de la Kastelo de la Bocca, en 1864. Unue oni ĝin uzis kiel ornamarbon en la ĝardenoj ; poste oni utiligis ĝin kiel avenuarbon.



En la deknaŭa jarcento, Kanno estis la preferata loko de la reĝoj kaj princoj el la tuta terglobo. Ĝi estis ankaŭ tiu de multaj anglaj aristokratoj, kiuj sekvante la ekzemplon de lordo Brougham (kiu malkovris Kannon kaj lanĉis ĝin en 1834) forlasis la londonajn nebulojn kaj Tamizon por vintre enloĝiĝi en nia urbo. Tiuj altrangulaj gastoj konstruigis mirindajn vilaojn kun parkoj kaj ĝardenoj, kie inter florbedoj kaj aleoj, la mimozo prezentis unu el la plej belaj ornamaĵoj. Poste, oni ĝin vidis plivastiĝi en la Esterela monto, sur la grundo elirinta el la diseriĝo de la gnejso kaj glimoskisto, kiu perfekte taŭgas al ĝi. Krome, la mimozo bone prosperas sur granitdevenaj grundoj sen kalko kaj humoriĉaj — kontraŭe, ĝi timegas malvarmajn kaj malsekajn grundojn, kiuj malfacile elgutas.

En la Kanna regiono tiuj ĉi kondiĉoj kuniĝas. Ĝi estas ŝatata de la mimozo. Privilegiita situacio en golfeto orientita al sudo kaj ĉirkaŭita de montoj, reguliganta influo de la maro estas speciale oportunaj al la planto. Plie, Esterelo protektas kontraŭ mistralo, vintre, kaj montoj proksimaj al Alpoj ŝirmas la regionon kontraŭ la nordaj ventoj. Efektive, la mimozo timas venton, ĉar agitado de la branĉoj kaŭzas frotadon de la floraj burĝonoj inter ili ; tiuj ĉi eluziĝas kaj malfacile ekfloras.

Tiai mimozo abunde troviĝas en Kanno, ĉefe sur la montetoj « La Croix des Gardes » kaj « Super-Cannes », same en la alta lando, nome en Mandelieu kaj en la montaro « Tanneron », kie grupiĝas la ĉefaj kulturoj.

Tiuj akacioj-mimozoj, el kiuj pli ol 600 specioj estas konataj renkontiĝas en ĉiuj tropikaj kaj subtropikaj landoj en la mondo, sed tiu floro troviĝas precipe en Aŭstralio, kie nombras ĉirkaŭ 300 speciojn ; kaj konvenas rimarkigi, ke la plejmulto de la akacioj enkondukitaj en nian regionon estas aŭstralidevena. Verdire, la karakterizaĵoj de nia klimato — temperaturo — sunfrapo — pluvoriĉeco — estas samaj, kiel en la sudaŭstralia regiono.

Mimozo eniris en la komercon de la plukita floro unuafoje en 1885, ĉe ROUSSET-DALON, en « La Croix des Gardes ». La parfumejoj en Grasse uzas ĝin ekde 1890 por eltiri el ĝi aroman oleon kaj krei valorajn parfumojn el la floroj de la sovaĝa mimozo rikoltita februare. De 1898 ĝis 1910, la kulturaĵoj senĉese vastiĝis pro la enkonduko sur la marbordon de novaj specioj. Sed, precipe la sovaĝa mimozo, malkovrita hazarde en Mandelieu, la plej bela kaj la plej konstanta, kiun oni nomis « la bona akcepto » (le bon accueil), estis la origino de tiu disvolviĝado.


Siaflanke, la Kanna Societo pri hortikulturo subtenis la komercan klopodon de la mimozoprodukistoj. Laŭ tiu pensmaniero ĝi organizis la 28 an de januaro 1928 la unuan apartan ekspozicion pri mimozo. En koro de la urbo, ĝi okazis, en vasta kampo je ĉirkaŭ 2000 kvadrataj metroj, situanta sur « la rue d'Antibes » kaj entuziasman sukceson atingis.

Baldaŭ la mimozaj plantaĵoj okupis 607 hektarojn en la departemento « Maraj Alpoj », el kiu vasta parto etendiĝas el Esterelo ĝis Kanno. La plantaĵoj situas en zono, kiu similas grandan triangulon, kies norda pinto estus en Tanneron ĉe Mouans-Sartroux kaj la du ekstremaĵoj de la bazo ĝis la limo de Théoule okcidente, al Golfe Juan oriente.

La mimozoj, kiuj etendiĝas ĉirkaŭ Kanno anstataŭas plejparte la pinarbarojn (el pinastroj kaj pinioj), kiujn gravaj brulegoj pereigis en 1959 kaj pli freŝdate en 1970, ĉar la mimozograjno estas ne detruita de la fajro. Kon-

traŭe, ĝi dissplitiĝas pro varmo kaj trovas en seka kaj kalcinita grundo la elementojn favorajn por sia eloviĝo.

Tiu mimozabundeco, iam, instigis, antaŭ pluraj jaroj inkludi « mimoza tago » en la programon de la vintraj festoj. Ekde la unua efektivigo, ĉiu konkuris kun inĝenieco kaj gusto por dekoracii fasadojn kaj magazenojn nur per mimozo. Koncerne la ĉefajn stratojn, ili estis ornamitaj per girlandoj kaj flagoj el mimozo. Tiu festo, poste, okazigis organizadon de defiladoj kun muzikoj kaj mimozobataloj tra la stratoj de la urbo. Interrompita dum kelkaj jaroj, post la brulegoj de 1970, ĝi denove enviciĝas inter la programeroj de la kalendaro kaj kaŭzas saman furoron kiel antaŭe.



Se oni konsideras nur la produktadon de la plukita floro, la utilaj specioj inkludas tri klasifikojn, kiujn oni diferencigas laŭ la foliaro :

— la « **floribunda** », kiu havas longajn foliojn. Oni nomas ĝin « kvar sezona mimozo » ĉar ĝi fakte florumas dum la tuta jaro.

— la « **motteana** », kies folio iomete blueta similas olivarbofolion. Ĝia florado etendiĝas komence de novembro ĝis la 15-a de decembro.

— la « **dealbata** », kiu kolektas ĉiujn selektitajn dentrandajn mimozojn, ekzemple : la « Bon accueil », « Mirandole », « Gaulois » « Tournaire », kaj la sovaĝaj mimozoj, kiuj libervole kreskas. En la Kanna regiono, sovaĝan dealbaton utiligas la profesiaj mimozistoj, kiel greftingon pro ĝiaj kvalitoj je fortikeco kaj nelacigebleco al la malvarmo. Alialoke oni utiligas ĝi floribundan, kiu sin alklimatizas en kalkaj grundoj, sed ne rezistas al malaltaj temperaturoj.

Ankaŭ kreskas en la regiono, ornamomimozo komune nomita « **raŭpa mimozo** ». Ĝiaj longformaj gladrandaj folioj pinte finiĝas. La floroj estas vivflavaj kaj sp.ke aranĝitaj. La planto rezistas al salaj grundoj, sed timas froston.

La hortikulturistoj, kiuj specialiĝas pri la forcado de l'mimozo kaj ĝ.a liverado dum la tuta vintro, kulturas ĉefe la dealbatan.

La procedo de la forcado estis malkovrita en 1882 laŭ hazarda maniero fare de Kanna lavistino, kiu prenis, en sian lavoĉambron butonan mimozobukedon kaj ĝin retrovis plene florantan morgaŭe. Sed, la ĝardenisto Louis Camatte, estis la unua, kiu alĝustigis la forcadon nun uzitan. Li havis la ideon banigi la mimozotigojn en malvarmeta akvo, konservante en taŭga ejo malsekan kaj varman atmosferon je temperaturo, kiu varias de 22 ĝis 24 gradoj. La forcaddaŭro ne povas superi 36 horojn. Dank'al tiu procedo, la hortikulturisto ekhavas plene florantan mimozon ekde la 15-a de decembro, kvankam ĝi florumas sur la planto nur meze de januaro. Tio ĉi ebligas al li sendi mimozon je Kristnasko.

Sed mallonge daŭras en apartamento la mimozo. Nu, ĉefa evento okazis lastajn jarojn pri la mimozindustrio, inventaĵo vere magia, frukto el longaj esploroj en laboratorioj ; ĝi nun ebligas ekfloriĝon de la mimozo certigante ĝian perfektan konservadon en apartamento dum unu semajno. Estas la pulvoro « special mimosa », kiu ĉe la profesiuloj estigis novan mimozon.

Post la brulegoj en 1970 la produktaĵo daŭrigas nekontesteblan restarigon. Dek jarojn poste la rikolto estis preskaŭ 1000 tunoj el kiuj pli ol 600.000 kilogramoj estis eksportitaj. Oni ekspedas ilin precipe al Nederlando, Germanujo, Belgjo, Britujo, Danujo, Svislando kaj kompreneble al ĉiuj nordaj francaj regionoj.

Mimozo estas sendita en kartonoj po tri kilogramoj en kiuj ĝi estas prezentata en tratruitaj saketoj el polietileno, kiuj entenas mimozopezon je 150 gramoj.

Tiel, tiu floro el lumo fariĝis la emblemo de nia lazura marbordo kaj precipe Kanno. En la tuta mondo ĝi vekas egalan fervoron, prilumante tie aŭ aliloke malagrablan straton, malsekan aŭ malvarman.

Pierre Loti ĝin prezentis kiel ornamon de beletaj pejzaĝoj en Tahitio, kie li konis la delican « Rarahu ». Ĉitie : ni aprezas la belecon de tiu floro kaj ĝian parfumon, sed ni havas pri ĝi unue veran karesemon, eble, ĉar ĝi estas nia amikecomesaĝisto tra la tuta mondo.

Mme Ménétrier.
trad. Sino Maillart.

ANGULO DE LA LEGANTOJ

Konforme al lasta decido de la Ĝenerala Asembleo de la kulturdomo Grésillon, paĝo estos rezervita al la leteroj de la legantoj ek de la venonta numero de Kulturaj Kajeroj.

Do, se vi deziras kompletigi artikolon per plua informo aŭ esprimi alian vidpunkton, vi nur skribu mallongan kontribuaĵon kaj sendu ĝin al mi (J.-P. Guillot, 21, rue des Aubépines, F — 86000 Poitiers).

Mi tre volonte aperigos ĝin, kondiĉe, tamen, ke ĝi ne estu polemika, atakema aŭ gramatika !

La redakcia sekretario,
J.-P. Guillot.

Paleolitikaj Venusoj

La plej antikvaj skulptaĵoj konataj reprezentas virinojn, al kiuj oni donis la nomon Venuso. Kvankam skulpitaj 20 000 jarojn antaŭ nia erao, oni ilin malkovris nur en 1896-1897.

Ili rezultas de longa tradicio, pri kiu oni retrovis, en okcidenta Francujo, nur kelkajn desegnojn mallertajn, kiuj estas krokizoj de homaj estaĵoj.

La statuetoj estis raraj en la paleolitika arto, almenaŭ en Okcidento ; en Centra Eŭropo kaj ĝis la suda Rusujo, ili estas pli multaj. (Ili apartenas al la periodoj diritaj Aurignacien kaj Perigordien ; ili malaperas en la Solutréen kaj Magdalenien, dum kiuj floras la bestaj plenaj reliefoj).

Kelkaj el tiuj praaj Venusoj karakteriziĝas per ekterordinara disvolviĝado de la formoj ; ili estas la « Dikventraj Venusoj ». La artistoj tre ampleksigis la atributojn de ilia sekso ; la dikegaj mamoj pendas sur la larĝe elstara ventro ; la generaj organoj estas troigitaj. Kontraŭe, sur la malgranda kapo, ovoida aŭ ronda, la trajtoj estas aŭ preterlasitaj aŭ sendetale montritaj. Nur la Venuso de Vistonice (Jugoslavio) havas vizaĝon. Hararo kelkfoje kovras la kapon. La brakoj ĝenerale ripozas sur la mamoj ; la gamboj finiĝas per piedoj etetaj aŭ tute ne ekzistantaj.

Tiu dikventreco igis pensi, ke la paleolitikaj Venusoj posedis, kiel la Boŝmanoj hodiaŭaj, graso-rezervon. Sed la Boŝmanoj vivas en dezerto kaj bezonas, eble kiel la kamelo aŭ la zebuo, tiun graso-rezervon. Tamen la paleolitika klimato tute ne montris la samajn kondiĉojn.

Tiu troeco estas ARTA KONVENCIO

La magio estas unu el la elementoj de la prahistoria arto. Pere de tiu arto, la paleolitikulo deziris proprigi al si la estulojn aŭ la estaĵojn, sub formo de bildo ; bildo, kiu povas nek eskapi, nek rezisti.



Lia celo estis kapti la fortojn de la Naturo.

Por nia tre malproksima praulo, la plej grava el tiuj fortoj estis la Fekundeco, kiu permesis al la homoj sin reprodukti ; ankaŭ al la bestoj, tiom utilaj pro ilia karno, ilia felo, iliaj ostoj kaj kornoj.

De la Virino la aŭrignaciaj skulptistoj konservis nur la Patrina kaj nutranta aparato ; ĉar ŝi estas la funto de naskiĝoj, de la daŭreco, de la multobliĝo.

Tiuj statuetoj plejofte estas tre malgrandaj. La Venuso de Lespugne (Francio) mezuras 14,5 cm. La kapo de la Damo de Brassempouy estas 3 cm-alta. Ili estas skulptitaj precipe el eburo sed ankaŭ el ŝtonoj (kalka ŝtono, serpentino, steatito). La Venuso de Kostienki (U.R.S.S.) estas vera ĉefverko de ina reprezentado ; tiu de Villendorf (Aŭstrio) ne havas vizaĝon ; tiu de Vestonice estas modlita el pasto farita per argilo kaj pistitaj ostoj ; en Petrkovice (Silezio) estas ina torso el skulptita hematito ; en Gagarino (U.R.S.S.) oni trovis tri figurojn preskaŭ kompletajn. Alie, en Bavario, Bade, en Moravio oni trovis inajn profilojn tre skemajn.

Tamen inaj statuetoj ne estas ĉiam dikventraj. Kelkaj estas plataj kaj nur kelkaj strekoj indikas la mamojn kaj la generajn organojn. Tia estas la « malpudora Venuso » trovita en Laugerie-Basse.

Kelkaj el tiuj statuetoj havas pendiĝo-truon ; sendube ili estis amuletoj, kiujn oni portis probable por faciligi la naskon.

Al tiuj skulptaĵoj oni devas aldoni la virinodesegnojn, kiujn oni trovis en la Madeleine ; mirinde elegantaj, ili ŝajnas esti anticipaĵoj de Modigliani ; ŝajnas ke la artisto ĉi tie deziris nur « krokizi homajn siluetojn » sen intenco de rito aŭ magio.

La viraj reprezentadoj estas malmultaj. Oni trovis nur fragmenton de vira statueto en Brassempouy kaj viran profilon sen kruroj en Laugerie-Basse. Sed en Kostienki tre interesaj estas la kapo-profiloj ĉi tie trovitaj : ili montras vizaĝojn, kiuj similas muzelojn ; ofte oni pensis, ke tiuj personoj portis bestan masklon.

La lignaj skulptaĵoj tute malaperis ; la nura ligna figuro trovita estas sur ligna fosto staranta en torfo.

Multe pli malfrue, dum la neolitiko, nur 2 000-1 600 j. antaŭ Kristo, la homoj, omaĝe al Fekundeco denove kreis inajn simbolojn. En Malte, ili estas el ŝtono kaj mezuras 48 cm. En Ekvadoro ili estas el ceramiko kaj malofte superas 5 cm. Ankaŭ la torfoj de Danlando liveris geometriajn stilizitajn formojn.

Oni sentas sin plena je admiro por tiu paleolitika homo, kiu, 20 000 jarojn antaŭ ni, estis kapabla ekkompreni la faktojn, fari deduktojn kaj krei simbolon.

Rimarkinda ankaŭ estas la fakto, ke sama simbolo, je la sama momento, naskiĝis en okcidenta kaj orienta Eŭropo kaj ankaŭ en Azio.

S. Guillot.

Kelkaj el vi ankoraŭ ne pagis
la jarabonon
ĉu ili povus rapidi?
Dankon al ili

Marko d'Oro la novelisto

Mi rapidis al la klubo « Verda Lumo », kiam hazarde mi ekvidis mian amikon « la grandan lingvo evoluiganton » en la restoracio Esperanto — ĝi troviĝas en Budapeŝto — ĉe la apudfenestra tablo inter libroj, vortaroj, paperoj. Li pipfumis. Ĝis nun li eĉ cigaredon ne fumis kaj havis okulvitrojn. Vidiĝis, ke li ege rompas al si la kapon. La magia forto devigis min eniri. Nu, mi demandos, kiel li fartas, kion li faras, mi trinkos tason da nigra kafo kaj daŭrigos mian vojon. Alpaŝante al lia tablo, mi dufoje diris al li silente :

— Salut' samio, ĉu permesates ? — Mi salutis lin laŭ lia lingvo- uzo, kio cetere tion signifas, ke saluton samideano, ĉu estas permesate ?

Li fine suprenlevis la okulojn kaj demandis :

— Ĉu vi alparolis min Esperante ? Ho, mi tre ĝojas, surseĝiĝu. Ho, estas vi, mil kaj unu pardonojn, ke mi ne rekonis vin, sed kiel vi vidas, mi estas laborprofundiĝanta.

— Kio okazis ? Vi pipfumas, havas okulvitrojn —, mi demandis.

— La verkistoj pipfumas. Mi estas tio. La okulvitroj estas sendioptriaj ; nur dum la verkado mi surmetas ilin. Nun li senokulvitrigis s.n. /Lia esprimo./

— Ĉu vi okupiĝas pri novaj vortoj, novologismoj, afiksoj, vortkunmetaĵoj, vortordo... — mi interesiĝis, sed li interrompis min ;

— Nur por mi —, sed nun mi interrompis lin — kaj por Kulturaj Kajeroj, ĉu ne ?

— Jes, jes, vi pravas. Do, mi gajnis en literatura konkurso. Mi fariĝis « KATO ».

— « Kio ? — mi alrigardis lin surprizite ».

— « Komencanta Amatora Talento Originala » — KATO, en la novela branĉo —, li daŭrigis memfide kaj ege eksuĉis la pipon, ke li malaperis malantaŭ la fumnubo.

— Sed mi ne legis vian nomon en la gazetoj —, mi diris, kiam li reaperis dorseniĝante surseĝe.

— Atentu, ne rapidu. La literaturan konkurson aranĝis ankoraŭ ne tre konata gazeto « Ĉieldirekta Prizmo », subtitolo : Norda-Suda-Okcidenta-Orienta, sub la devizo « Paplio surflore ». Jen la anonco : « Ĉiu gajnas, ĉar ne estas malbona verko, nur malbona leganto ». Ili promesis aperigi la gajnintajn literaturaĵojn : « Ni prizorgas, ke la verko ne ripozu en la ĉerko ! ». La gazeto ne aperigas recenzojn, ĉar recenzo estas la opinio de unu persono kaj tio ne povas esti tiu de aliaj mil legantoj, kiuj eble ĝuste pro la recenzo ne aĉetos la libron.

— Hm, hm, vere, ankaŭ tio ne estas indiferenta, kie la libro estas eldonita ? En kelkaj revuoj la recenzoj okupas la duonon de la tuta revuo kaj foj-foje la grandliteraj titoloj estas pli ampleksaj ol la recenzo mem. Sed ni lasu tion. Vi neniam okupiĝis pri literaturo, verkado, traduko ! Via « forta flanko », via talento estis ĉiam la gramatiko !

— Vi pravas. « Estis », sed kion mi spertis ? Oni ne scias, povas, scipovas, povoscias, volas kompreni min, majn ideojn, pensojn pri la gramatikaj proponoj. Kaj kio vidatas ? Absolute nekonataj nomoj gajnas en belartaj konkursoj. Kiel ? Mi ne scias. Ne gravas. Ilia afero. Sed mi...

— Mi mortos tuj de la scivolemo —, mi interrompis lin. Li klinis pli proksimen al mi.

— Mi tradukis novelon, sanĝis la nomojn, la lokojn kaj jen la novelo originale verkita de Marko D'Oro.

— Do, ne vi verkis la novelon ! — mi diris mire.

— Kompreneble mi. Ĝi estas mia verkista pseŭdonimo.

— Sed ĝi sonas kiel Marko Polo.

— Nu, kion fari, se li naskiĝis pli frue ol mi. Cetere ĉi tiu nomo estas facile tradukebla en aliajn lingvojn. Ĝi estas la preskaŭa traduko de mia nomo.

— Sed fine parolu pri via ideo ! — Mi urĝigis lin, kvankam hodiaŭ mi volis viziti la klubon Verda Lumo, kie oni projekcios dapozitivojn pri Saharo dum du horoj kaj centfoje ripetiĝas ; sablo, oazo, kameloj, ĉielo, arabo, palmo.

— Nu, tre mallonge. Mi vizitis hazarde mian avinjon, kiu estis anglalingva profesorino kaj kiu havas duonĉambron da anglaj revuoj, gazetoj. Hazarde mi eltiris unu. En ĝi mi trovis novelon : « Lumstrio tra la fermita fenestro ». Tuj mi legis ĝin, ĝi ekplaĉis al mi, tradukis ĝin kaj... tiam venis al mi la ideo, ĉar ĝuste tiutage mi legis la anoncon de la konkurso.

— Ho, hazardo, kial vi ĵetis min ĝuste ĉi tien ? — mi pensis en mi mem, trinkante la lastajn gutojn de la kafo. — Mi nenion komprenas — mi diris.

— Mi ŝanĝis iome la novelon kiel mi diris al vi ; ĝia titolo fariĝis post longa meditado ; « Ĉu ŝi flugis per nifo ? », pli aktuala vojaĝilo ol tramo aŭ kosmoŝipo, se vi legas la revuon Monato. En la novelo evidentiĝas, ke ŝi faras la lumstrion per la nifo tra la fenestro, ĉar en la kurteno estis truo, pri kio la loĝposedanto ne sciaŭ, ekkaptas lin la ektimego..., sed jen la gazeto, legu ĝin vi mem hejme ĉi-vespere, se vi ne estas timema kaj transdonas la Ĉieldirektan Prizmon.

— Ĉu via novelo gajnis la unuan premion ? — mi demandis.

— Ne. Mi fariĝis kiel mi diris KATO. Laŭ mi tio estas pli grava, pli granda rezulto ol la unua aŭ la tria premio.

— Certe vi pravas — mi flustris —, sed se iu ekscios, trovos la novelon, vidos, ke la via kaj tiu...

— Kalkulu samiĉjo ! Kiom da personoj legas la gazeton ĈP, el ili, kiuj scias angle, el ili kiuj havas ĝuste ĉi tiun numeron de la anglalingva revuo : « Revuo de la Anglaj Junulinaj Moŝtoj » aperinta inter la du mondmilitoj ! Eblas, ke dum la dua milito ĉiuj numeroj perdiĝis, pereis kaj nur mia kara avinjo Marilinjo havas kelkajn jarkolektojn.

— Jes, jes, sed... Ĉu via konscienco estas trankvila ?

— Trankvila kiel la nokto meze de la Saharo /eble en la klubo ĝuste nun vidas la klubanoj la « saharan nokton »/. Finfine mi riĉigis nian literaturon, ĉu ne ?

— Ĉu jes ; pardonon pro mia lingva eraro —, balbutis — tamen...

— « Kiu riskas nenion, tiu havas nenion » — diras la francoj kaj mi, do proksimume kvindek milionoj da homoj. Aŭ jene « Se vi riskas nenion, vi ne gajnos premion ! ».

— Mi hezitis, ĉu gratuli al li aŭ senmaskigi lin, skribi al ĈP ? — mi meditis en mi mem —, finfine al kiu li malutilis ?

— Mi rapidas hejmen, ĉar mi estas tre scivolema pri via novelo —, mi mensogis — kaj mi volas nepre televidi la filmon « NIFO-atako kontraŭ nia Tero ».

— Bonega ideo ! Mi verkos el la novelo scenarlibreton por TV ! Dankon por la ideo, mia kara amiko, renkontiĝo kun vi ĉiam turnas antaŭen la radon de mia vivo —, li diris saltleviĝante. Sed tiam jam ankaŭ mi staris, haste adaŭis lin kaj preskaŭ kure mi forlasis la restoracion. Bonŝance mi jam pagis la kafon.

I. NAGY.

TIO RESTU INTER NI !

Aŭtuno. La hodiaŭa dimanĉo estas unu el tiuj belaj sunaj tagoj, kiuj invitas la urbanojn eliri el siaj hejmoj por promenadi.

Mi sidis sur benko en la parko de la Libereco, rigardante la promenantojn. Sub.te, mia atento estis altirita de du virinoj, pasantaj preter mi, kiuj interparolis kun entuziasmo, laŭte kaj samtempe, jes — samtempe !... Eble ili multe pli ŝatis la minutojn mem de la babilado ol perdi tempon por tolereme aŭskulti unu la alian... Ĉu ili sukcesis interkompremi sin, mi tion ne povas scii, sed ili donis al mi la ideon ŝerci per la frazo : « TIO RESTU NUR INTER NI ».

Estis dek-unua horo antaŭ tagmeze, kiam mi vidis mian najbarinon Dimitrina irantan al mi. — Jen oportuna okazo — ekpensis mi, kaj kiam ŝi proksimiĝis al mi, mi salutis ŝin :

— Bonan tagon, kamaradino ! Ĉu vi deziras sidiĝi ĉe mi kaj iomete ripozi ?

— Dankon ! — ŝi respondis — mi rapidas ; mi serĉas mian infaneton Stefĉjo, kiu ludis apud mi, kaj mi ne povas lin trovi.

Dirinte tion, ŝi provis liberiĝi de mi, sed mi demandis ŝin :

— Ĉu vi scias pro kio do la geedzoj Pacov interkverel.s ?

— Sed kio okazis ? Mi aŭdis nenion pri ili ? — demandis ŝi scivoleme.

— Oni diras, ke ili interŝanĝis ofendajn vortojn t.el laŭte, ke eĉ iliaj najbaroj aŭdis tion. Sed mi petas vin, tio restu nur inter ni ! Estas ja malinde klaĉi kontraŭ homoj...

— Sed t.o ne estas ebla ! Ĝis nun mi aŭdis nenian vorteton pri ili. Kia diablo eniris en ilian domon ! — emociite respondis Dimitrina.

— Tion mi ne sc.as, sed laŭ mi, verŝajne estas iuj bagatelaĵoj.

— Kaj... Dio gardu, se ili jam sentas sin fremdaj unu al la alia kaj ne povas sin toleri plu — kaj mi ĵetis rigardon al ŝia tre larĝe dekoltita kolo en kies profundo montriĝis la ĉarmo de t.u juna kaj bela virino...

Adiaŭinte kaj irinte 10 — 20 paŝojn, ŝi renkontis sian najbarinon Angelina.

— Kara franjo, mi tre ĝojas renkonti vin. Ĉu vi aŭdis ion pri skandalo en la familio Pacov ?

— Kia skandalo ? ! Mi ne komprenas vin... — respondis Angelina.

— Mi ankaŭ ne supozis, sed jen la fakto : Ofte Pacov, la edzo, revenis hejmen tre malfrue. Iun vesperon lia edzino renkontis lin kun telero en la mano, kiun ŝi ĵetis sur lin. Li eĥemis pro doloro kaj okazis granda skandalo...

— Kiel do estas eble ?... Ili vivas tiel kviete, ke aliuloj eĉ envius ilian feliĉon !

— Vi estas tre naiva, franjo mia — diris D'mitrina —. La homoj scias kiel kaŝi sian intiman vivon. Tiu skandalo finiĝos nepre per eksedziĝo...

— Kia do estas la kaŭzo ?

— M. tion ne scias. Eble la historio pri adulto de la edzo... Sed tio restu nur inter ni ! ha ! Mi estis forgesonta, ĉu vi vidis ie mian infanon ?

— Mi vidis lin ĉe la luliloj...

Mia naiva frazo « Tio restu nur inter ni » cirkulante de buŝo al buŝo kaŭzis kelkajn malagrablaĵojn...

Ekzemple, mia heroino Dimitrina longe serĉis sian infaneton ; al alia virino la manĝaĵo restis sen akvo sur la forno, sed spite ĉion, la famo kuris, eĉ kureg.s tra la tuta urbo.

Tiun vesperon, je la dek-oka horo denove mi renkontis Dimitrina'n, la saman, al kiu mi diris tion pri la familio Pacov.

— He, k'an novaĵon vi portas ? — mi demandis ŝin.

— Mirakloj okazas sur la tero, strangaj mirakloj, — ekkriis Dimitrina, kaj daŭrigis : — Pacov, la edzo, amindumis la amikinon de sia edzino, ŝin certigante, ke li forlasos sian edzinon por preni ŝin, la amatinon. Pro iliaj intimaj rilatoj, ŝi fariĝis patrino de unujara infano.

La patrino-amatino, kompreninte, ke li trompas ŝin, plendis ĉe la tribunalo kaj oni kondamnis lin por zorgi pri la v.vtenado de la infano. Tion eksciis lia edzino kaj kiam iun vesperon ŝi lavis teleroĵn, okazis la skandalo. La edzino rimarkis sian edzon, enirantan la hejmon senbrue, kaj konstatis, ke li odoras je parfumo... Ŝi tuj demandis lin kial li revenas tiel malfrue kaj kiel vera ŝtelisto... Li klarigis, ke okazis kunveno, kiun li partoprenis. La edzino ekkoleris pro lia evidenta mensogo kaj denove demandis :

— Kiu est.s preleginto, kiu aspergis vin per bonodora fluidaĵo ?

Kaj en incitita stato, ŝi ĵetis teleron, kiu trafis lian kapon. Li falis teren en senkonscio kaj oni forveturigis lin en la hospitalon. Ŝi jam estas doninta petskribon pri eksedziĝo. Mi aŭdis tion de kredinda fonto...

Ni adiaŭis unu la alian. Kaj mi, promenante sur la strato, komencis pripensi : ĉu tio estas vera aŭ rezulto de mia ŝerco. Kaj mi mem komencis kredi tion kiel veraĵon...

Subite, por mia plej granda surprizo, mi renkontis geedzojn Pacov, elirantajn brak' sub brake el la kvartala kinejo kaj gaje interparolantajn...

Dimitro Borisov.

FOTOJ SERĈATAJ

Okaze de la 30-a datreveno de Grésillon, ni intencas konsistigi retrospektivan fotlibreton pri la historio de la Kulturdomo.

Se vi posedas **bonkvalitajn** fotojn aŭ (ankoraŭ pli bone) negativojn pri la inaŭguro, pri vintraj festoj, pri la ĉasdometo, pri iamaj aktivuloj, pri antaŭa stato de la ĉambroj, ktp..., bonvolu helpi nin skizi la evoluon de nia domo : **tuj** sendu la materialon al

Henri Boyet
Grésillon
49150 BAUGE

Ni resendos ĉion kun granda dankemo fine de la somero kaj mencios la pruntedonintojn en la libreto. Ek al viaj arĥivoj !

POR VIA DISTRO

SOLVOJ DE LA ANTAŬAJ PROBLEMOJ :

	1	2	3	4	5	6	7	8
1	T	E	L	E	F	O	N	I
2	E	F	E	M	E	R	A	
3	L	E	G	A	T	O		
4	E	M	A	D	O			
5	F	E	T	O				
6	O	R	O					
7	N	A						
8	I							

	1	2	3	4	5	6	7	8
1	K	A	T	A	L	O	G	O
2	A	M	O	R	A	D	O	
3	T	O	P	O	R	O		
4	A	R	O	M	O			
5	L	A	R	O				
6	O	D	O					
7	G	O						
8	O							

	1	2	3	4	5	6	7	8
1	L	I	B	E	R	E	C	O
2	I	T	A	L	U	J	O	
3	B	A	R	I	L	O		
4	E	L	I	T	O			
5	R	U	L	O				
6	E	J	O					
7	C	O						
8	O							

HUMORAĴOJ :

La tri amikoj :

Tri junuloj kuregante alvenis al la stacidomo kaj interesiĝas pri la ekiro de la trajno al la ĉefurbo.

— Ĉi-momente ĝi iris for — diras la dejoranta fervojisto — jen, vi povas ankoraŭ vidi la lastan vagonon.

Ili dankas lin por la informo kaj decidas trinki kelkajn glasojn da vino en la najbara restoracio, ĉar la sekva trajno ekiros post unu horo.

Post unu horo ili denove kuregante alvenis, sed ankaŭ nun malfrue, ĉar ili vidas nur la lastan vagonon. Ĝis la ekiro de la sekva trajno ili havas unu horon, do kion fari, ili reiris por trinki kelkajn glasojn da vino.

Ankoraŭ trifoje okazas la sama sceno, kiam finfine ili ĝustatempe alvenis kaj du el ili sukcesis salti en la lastan vagonon. La tria senvorte rigardas la malproksimiĝantan trajnon kaj subite li laŭte ekridas. La dejoranta fervojisto mire demandas kial li ridas, ja li malfruis la trajnon.

— Ĉar — respondas tutkore ridante la junulo —, mi volis vojaĝi al la ĉefurbo, ili nur akompanis min !

Trad. S. Nagy.

ŜERCOJ :

Edzino al sia edzo :

— Mia kara, mi volas viziti Beligan Instituton, donu al mi dek dolarojn.

— Jen, kvindek — diras la edzo.

***

Smit renkontiĝas surstrate kun sia amiko Braün, kiu enpensiĝe promenas.

— Ko estas al vi ? — demandas Smit.

— Kio ? La araboj — respondas Braŭn.

— Ĉu la teroristoj timigas vin ?

— Tute ne. La prezo de la benzino.

— Kio ? La benzino ? Kiom koncernas vin la prezo de la benzino, ja vi ne havas aŭton !

— Jes, sed mi havas benzinan fajrilon — respondas Braŭn.

S. Nagy.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

◆◆◆◆

Konjunkcio

ESTAS NEŜANĜEBLA VORTO, KIU KUNLIGAS VORTOJN KAJ FRAZOJN DE SAMAJ naturo kaj funkcio :

— **aŭ, ĉar, do, kaj, ke, nek, sed, tamen.**

ILI PRECIZIGAS LA RILATON INTER LA FRAZELEMENTOJN :


— **diferenco :** (aŭ ekvivalento) teo aŭ kafo -venki aŭ morti- nitrogeno aŭ azoto.
— **klarigo :** li estas mia onklo, ĉar frato de mia patro.
— **logikan konkludon :** mi devas do decidiĝi, ĉar vi tiel volas.
— **kunligon :** mi vidis kaj lin kaj lian fraton.
— **ankaŭ ne :** restas nek konsilo, nek konsolo.
— **kontraŭecon :** lango miela sed koro kruela.
— **malgraŭ tio :** la maljuna avo tamen restis ĉe sia laboro.

Pacienco kaj longtempo...



Finfine mi denove povos agrable tranokti en mia fotelo. Dum unu tuta semajno, ĉiun nokton, sinjoro Arnoldo fajlis kaj fajlis... la duoblan baron de sia fenestro. Kredu min, estas tre malagrable. Finfine, li sukcesis eskapi el sia malliberejo.

Ha ! tiuj infanoj !



Ne kaj ne ! mi bedaŭras, sed, por la lasta fojo, mi ripetas, ke mi ne povas kontentigi vin ; ĉar mi ne havas pasteŭrizitan lakton !

Povra karulo !



Mi petas vin, Sinjoro Direktoro : mi ne povas legi tion, kion vi skribis sube de mia verkaĵo ; do, estus bone, ke vi pli legeble skribu !

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichs trasse, 2, LINZ (170 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (330 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (5,00 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregards vej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (65 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivis töntie, 05510 Hyvinkää 51 (44 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KAS SEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brŭcke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10° - D ALICANTE - (850 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Gorizia 17, 28100 NOVARA — p.k. 14321285 (10 600 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoons traat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk 209721 (22 guld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bœ Maridalsveien 128 A OSLO 4.

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSO VIO (12 us. dol.).

Svedujo : Eldona Societo Esperanto, poŝtkonto 596768-2 216.11 Malmö (45 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (22 fr.).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Weno nah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj lan doj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 3 de 1982, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Le printemps a amené une centaine de personnes dont soixante enfants de quatre pays différents d'Europe à travailler et à se distraire côte à côte pendant une semaine à Grésillon, pour la 8e Rencontre Internationale d'Enfants. Travail des enfants le matin dans cinq cours différents. Réunion des adultes l'après-midi pour discuter du rôle et du contenu des échanges scolaires et des rencontres internationales. A cela ajoutons des excursions, une exposition de dessins et de peintures de plusieurs pays, des promenades, des travaux manuels, la mise en forme d'un reportage photographique. Espérons que le journaliste a vu clair qui a titré un article : « L'Europe en formation au château de Grésillon ».

L'Assemblée Générale s'est tenue le 18 avril. Vous en trouverez un compte rendu dans ce numéro. Après discussion les membres présents ont approuvé les comptes et le bilan ainsi que l'action du Conseil d'Administration pour l'année 1981. Ils ont tenu à remercier les donateurs anonymes qui, par leur générosité, nous ont permis de faire des travaux qui risquaient d'attendre encore un peu. Le renouvellement d'une moitié du Conseil d'Administration s'est déroulé sans surprise : les six candidats ont été réélus ou élus. Nous saluons avec plaisir l'élection de Henri Boyet, le benjamin du Conseil. Il est à souhaiter que dans les années à venir d'autres gouttes de sang nouveau viennent prouver à l'organisation de trente ans qu'est la M.C.E. qu'elle a encore un bel avenir.

Le Conseil d'Administration a ensuite examiné un certain nombre de points et élu son nouveau bureau, jumeau de l'ancien. Il a décidé de proposer à Robert Lloancy et Willy Grela le titre de conseiller technique, que l'aide qu'ils apportent au fonctionnement des stages depuis plusieurs années justifie amplement.

Parmi les suggestions qui ont été faites et dont certaines ne pourront être examinées que lors d'une prochaine réunion, l'une au moins vous concerne tous. Je la répète telle qu'elle a été faite par madame Simone Humm : « Pourquoi ne pas demander aux amis que ceux qui le veulent paient un arbre ? Geste symbolique qui plairait certainement à beaucoup ». Qu'en pensez vous ? Il y a des arbres décoratifs à remplacer ainsi que quelques arbres fruitiers dans le jardin. La réponse à cette suggestion ne peut venir que de vous.

Jusqu'ici le nombre des inscriptions pour l'été n'est pas tout à fait aussi important que l'an dernier. Proximité du Congrès de U.E.A. ? Nouveau découpage des stages ? Il y a cependant encore un nombre assez important de demandes de renseignements qui arrive. Alors faites vite tout de même.

P. BABIN.

INTER NI

La printempo arigis cent personojn el kiuj se dek infanoj el kvar landoj por labori kaj sin distri kune dum unu semajno okaze de la 8-a Internacia Renkonto de Infanoj. Al la matena laboro de la infanoj en la kursĉambroj aldoniĝis ekskursoj, ekspozicio de desegnaĵoj, promenadoj, manlaboroj. Konkludon de tiu renkonto donis regiona ĵurnalisto, kiu titolis artikolon : « Eŭropo formiĝas en Gresillon ».

La Ĝenerala Asembleo okazis la 18-an de aprilo. Ĉikune vi trovos la raporton. Ĝi varme dankis la anonimajn donacintojn, kiuj per sia malavareco ebligis laborojn atendantajn jam de kelkaj jaroj. La renovigo de duono de la konsilantaro permesis al Henri Boyet esti elektita. Li estas la plej juna el la konsilantoj kaj, ni esperu, la unua guto de nova sango en 30-jara korpo.

La Konsilio poste decidis proponi al R. Lloancy kaj W. Grela fariĝi teknikaj konsilianoj pro la granda helpo, kiun ili alportas en la funkciado de la someraj aranĝoj jam de pluraj jaroj.

El la sugestoj faritaj, kiuj estos diskutataj okaze de venonta kunveno, almenaŭ unu interesas ĉiujn : « Kial ne peti de amikoj, ke volontuloj pagu unu arbon ? Simbola gesto, kiu certe plaĉus al multaj ». Kion vi pensas pri tio ? Vi mem povas respondi.

Assemblée Générale du 18 Avril 1982

Monsieur le Président Babin ouvre la séance à 10 h.

Le quorum étant atteint (257 membres sont présents ou représentés), l'Assemblée élit Mme Vincent présidente de séance.

Les membres suivants étaient excusés : Mmes Cheverry, Micard, MM. Bodereau, Chevalier, Lemagadure.

Rapport financier, présenté par le trésorier, Dominique Babin.

Il y a cette année un excédent de recettes. Des dons plus importants permettront d'augmenter les réserves l'année prochaine.

Les recettes de fonctionnement ont augmenté de 15 %, ce qui correspond à l'augmentation des tarifs puisque le nombre des nuités est à peu près le même.

On constate une baisse dans la rubrique souvenirs et librairie. Comme chaque année, le budget des activités culturelles s'équilibre. Faible augmentation de l'alimentation (4 %).

La masse salariale n'augmente que de 8 % puisque le jardinier a été malade pendant un mois. De plus, Mme Corvaisier assure 8 heures de travail en moins. Les charges sociales ont augmenté de 5 %.

Les autres dépenses n'appellent pas de commentaires.

L'excédent de recettes est revenu à un taux encourageant (10 %), alors qu'il était nul l'an dernier.

Les investissements ont été augmentés de 50 % car, en 1980, certaines sommes avaient été gelées en prévision de ces travaux.

Il y a eu plus de rentrées que de sorties de parts de sociétaires : 29 nouveaux sociétaires, 4 départs, 37 nouvelles parts souscrites. Le problème de la réévaluation des parts est évoqué, mais cela présente des difficultés qui ne permettent pas de donner une réponse positive dans l'immédiat.

Les commissaires aux comptes, Mrs Prévot et Cortez, ont donné quitus au trésorier. L'Assemblée Générale désigne comme commissaires aux comptes MM. Cortez et Lafargue et remercie M. Prévot qui a assuré ce rôle pendant de nombreuses années.

L'Assemblée Générale adopte à l'unanimité le Compte d'Exploitation et le Bilan de l'année 1981.

Résultat des élections au Conseil d'Administration.

Les conseillers sortants sont réélus et l'élection de Henri Boyet est enregistrée avec satisfaction par l'A.G. qui lui souhaite la bienvenue.

Les candidats ont obtenu, sur 232 votants, le nombre de voix suivant :

Pierre Babin : 232.
Dominique Babin : 232.
Henri Boyet : 229.
Pierre Chevalier : 227.
Bérangère Cheverry : 231.
Jean-Paul Guillot : 232.

Rapport d'activités.

Le problème essentiel est posé par les soirées qui sont diversement suivies. Il apparait impossible de réunir tous les stagiaires sur une même activité de loisirs. Le rapport d'activités, que tous les sociétaires ont reçu, est adopté à l'unanimité.

Enquête dans la revue Kulturaj Kajeroj.

Jean-Paul Guillot fait remarquer que le nombre de réponses a été très faibe (12 au 15 avril). La diversité des réponses rend leur classement difficile et ne permet pas de tirer des conclusions exploitables. Un débat s'installe dans l'assemblée qui permet de dégager quelques idées principales :

Il semble possible d'envisager la création d'une rubrique des lecteurs désirant commenter les articles de la revue, ainsi que d'une chronique pour les jeunes. Une page pour les débutants serait intéressante. Il faudrait également une plus grande fréquence d'articles sur la vie de la Maison Culturelle.

Questions diverses.

A l'occasion du 30e anniversaire, un dessin à la plume du château format 30 × 50 et format carte postale sera proposé à la vente aux stagiaires l'été prochain.

L'ordre du jour étant épuisé, l'Assemblée Générale est close à 12 h. 30.

Le secrétaire de séance,
Guy Dairon.

Conseil d'Administration du 18 Avril 1982

Election du bureau.

L'ensemble des membres du bureau sortant est réélu à l'unanimité. Robert Lloancy est élu Conseiller Technique. Le C.A. décide de proposer à M. Grela d'entrer au Conseil comme Conseiller Technique.

Stage de Pâques.

Le nombre d'enfants a été plus grand que l'an dernier, et les cours ont été bien organisés et bien suivis. L'Esperanto a été utilisé couramment par les enfants. La présence de certains adolescents a été plutôt négative car ils faisaient bande à part.

Stages d'été.

PREMIERE PERIODE :

Il y a à peu près le même nombre d'inscriptions que l'an dernier. Un certain nombre de sujets de conférences ont été annoncés par leurs auteurs.

A l'occasion du 30e anniversaire, de nouvelles médailles et photos seront proposées aux stagiaires.

Des cours seront organisés à la demande.

Administration : M. et Mme Pierre Babin.

DEUXIEME PERIODE :

Cours conduits par M. Parisot, Mme Childs-Mee, M. Molisson.

Administration : Pascale et Nicolas Babin.

TROISIEME PERIODE :

Activités manuelles avec Françoise Leriche, Conférences de M. Rollinger.

Administration : Mmes Lenel et Vincent.

QUATRIEME PERIODE :

Atelier photo avec M. Grela et Henri Boyet, danses avec Mme Grela, cours éventuellement, atelier de lecture avec M. F. Boyet, discussions sur l'histoire de l'Esperanto animées par M. Ribot.

Administration : Janette et Jean-Paul Guillot.

A la fin du quatrième stage, Week-end de Literatura Foiro.

Questions diverses.

La municipalité de Baugé a promis d'installer une signalisation indiquant le château de Grésillon pour l'été.

Des documents sur Grésillon ont été présentés au public à l'occasion d'expositions de l'Association Culturelle du Baugeois qui ont eu lieu dans différentes communes de la région.

Mme S. Guillot propose d'alléger le premier cours par correspondance.

Robert Lloancy a présenté différentes propositions qui seront étudiées lors de réunions ultérieures du bureau.

Travaux.

Des dons anonymes importants ont permis l'installation de la distribution de l'eau chaude dans les communs, ainsi que la réfection de la salle de vannerie.

Le moteur de la chambre froide devra être changé.

Il faudra également envisager le raccordement de la propriété à l'adduction communale de l'eau courante.

La séance est levée à 17 heures.

Le secrétaire de séance,
Guy Dairon.

LIBRO--SERVO

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

Adressez vos commandes à :

Janine VINCENT
B.P. 54
49150 BAUGE

Intitulé pour les chèques :
Maison Culturelle Esperantiste
C.C.P. : 1 485 39 P NANTES

Port gratuit pour commande au-dessus de 100 F.

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 80,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 80,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 50,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

Les extraits de notre catalogue

★

Aujourd'hui...

"LIBERTÉ OU AUTORITÉ DANS L'ÉVOLUTION DE L'ESPERANTO"

(en français)

Thèse de 3e cycle de François Lo Jacomo

Prix : 90 F.